# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

PRIEURE SAINT-MARTIN
77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)



Prezidanto: S-ro A. BESSIERE 28, rue C. Saint-Saëns 76000 ROUEN
Sekr: F-ino G.PREUX 55/3 Rés. Terrasse R. du 11 novembre 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT 26 bis, rue Milngavie 49150 BAUGE
Religia konsilanto: P-ro L. BOURDON 7, av. Salomon 59000 LILLE
Peranto I.K.U.E: P-ro R.DEGRELLE 12,r.Estienne d'Orves 54490 PIENNES



C.C.P: Association Catholique Française pour l' Esperanto 2324 93 N ROUEN.

==== la n°: 8 F. Abono: 30 F (TTC). Kotizo: 10 F. Sume: 40 F. ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

==== N° 169 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====

*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== JUNIO 1991 ====

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent <u>nepre antaŭ</u> la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++


## LE MOT DU PRESIDENT

Le temps des vacances qui approchent est aussi celui de la découverte des étrangers, rendue plus facile et plus complète, grâce à la Langue Internationale. Profitons-en pour apprécier à sa juste valeur l' enrichissement qu' apporte le contact amical avec les autres.

Et si nous ne voyageons pas, pourquoi n' élargirions-nous pas nos connaissances en lisant, soit des traductions, soit des oeuvres écrites directement en Esperanto? Le contact par le livre est aussi profitable que celui qui s' accomplit de vive voix.

Un espérantiste, catholique de surcroît, laisse toujours sa porte grand ouverte pour accueillir et comprendre ses frères étrangers et en tirer profit.

A. B.

## LA BILETO DE LA PREZIDANTO

La alproksimiĝanta feriotempo estas ankaŭ tiu de la malkovro de la alilandanoj, pli facila kaj kompleta dank' al la Lingvo Internacia. Ni profitu tion por ĝuste taksi la riĉiĝon, kiun alportas amika kontakto kun aliaj.

Kaj se ni ne vojaĝos, kial ni ne plivastigus nian scion legante ĉu tradukojn ĉu originalajn esperantaĵojn? La kontakto per libro estas tiel profitdona kiel la parola.

Esperantisto, krome katoliko, ĉiam lasas sian pordon larĝe malfermitan por akcepti kaj kompreni siajn alilandajn fratojn kaj el tio pliriĉiĝi.

* * * * *

AGRABLAN KAJ RIPOZIGAN SOMERAN LIBERTEMPON NI DEZIRAS AL NIAJ LEGANTOJ.

## AGADRAPORTO 1990

La bulteno regule kaj akurate aperis dank' al la senlaca laboro de la redaktorino, S-ino Vincent, kaj de nia presisto, F-to Marmou. Depost la jarfino, mi eĉ posedas propran maŝinon por multobligi ĝin. Ni povis aĉeti tiun maŝinon dank' al malavara anonima donacinto, kiun mi hodiaŭ deziras publike kaj varme danki je mia nomo kaj tiu de nia asocio.

Nia jara kongreso okazis en Bouresse (Vienne) komence de majo. Tie la Kvinpetalo afable akceptis nin en tre simpatia etoso. La vetero, tre suma, agrabligis la restadon dum la ĉeestantoj pritraktis la kongrestemon "Amo de Dio, amo al Dio" sub la kompetenta gvidado de P-ro Bourdon, kun partopreno de S-ro Cousson, KELI-ano.

Bedaŭrinde, en 1990, ni perdis pliajn anojn: ni estis 165 en 1988, 156 en 1989 kaj nur 152 en 1990. En tri jaroj, ni do perdis 13 anojn. Pro tio la emspezoj iomete malkreskis, dum la vivkosto iom kreskis kaj malhelpis nin en nia agado. Estus necese varbi novajn anojn aŭ havi pli da bonfaraj membroj.

Tamen la pasinta jaro alportis la ĝojigan novaĵon pri aprobo de la liturgiaj tekstoj en Esperanto. Tio ebligos al ni inde diservi kaj samtempe estas agnosko de la valoro kaj universaleco de nia lingvo.

Fine, mi aldonas, ke dum la UFE-kongreso en Blois, kie bone laboris nia estrarano S-ro Pons, okazis diservo kuncelebrita de tri pastroj.

Mi dankas ĉiujn anojn pro ilia fideleco al nia asocio kaj speciale vin ĉiujn, kiuj venis en Amiens por partopreni la kongreson de 1991.

A. B.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## LA HOMA VIGLECO

Jerusalemo, levu la kapon!

Rigardu la vastegan popolamason de la konstruantoj kaj serĉantoj. En la laboratorioj, studioj, dezertoj, fabrikoj, en la grandega socifandujo, ĉu vi vidas la servutulojn?

Nu! Kio fermentas per ili pri arto, scienco, penso, tio estas tute por vi.

Nu! Malfermu la brakojn, la koron kaj akceptu, kiel via Sinjoro Jesuo, La fluon de la homa vigleco.

Akceptu tiun viglecon, ĉar sen ĝia ago, vi velkos sen deziro, kiel floro sen akvo; helpu al ĝi, ĉar sen via varmo, ĝi disiĝos senbride je senfruktaj tigoj.

Teilhard de Chardin

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## LA GIGANTA LUTRO

En la supra valo de la rivero Orenoko vivas la giganta lutro. Tiu ĉarma mambesto estas preskaŭ du metrojn longa. Scivolema, ludema, ĝi ŝatas naĝi en ne tro profundaj akvoj, kie ĝi kaptas la fiŝojn, kiujn ĝi manĝas ĉiam ekde la kapo.

La giganta lutro bojas kiel hundo. Pro tio, la unuaj Hispanoj, kiuj malkovris ĝin, nomis ĝin riverhundo.

La giganta lutro havas malamikojn; inter ili, la terura jaguaro emas ĉasi la sendanĝeran gigantan lutron. Sed ĝia plej malbona malamiko estas la homo, kiu ĉasas ĝin por ĝia valora felo. La venezuela leĝo protektas ĝin, sed en la ĝangalo estas malfacile sendi policanon, por ke la leĝon oni respektu.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

## NIA MEMBRARO

Novaj membroj: 2) S-ro SCHRYVE (Somme); 3) S-ino DEQUIRE (Somme); 4) S-ro HENIN (Somme); 5) D-ino LAZIB (Essonne); 6) S-ro COMTE (Rhône)

Koran bonvenon al ili!

Membroj bonfarantoj: 3) S-ino GILLES (B-Rhin); 4) P-ro RUNPAOT (Finistère)

Dankegon al ili pro ilia financa helpo!

## BOULOGNE-sur-Mer

Em la sama tempo kiel la FKEA-kongreso, okazis la nacia en Boulogne/Mer. Tio forprenis el niaj vicoj kelkajn elementojn, bedaùrinde, sed tiu koincido havis ankaù pozitivajn flankojn. Ĉar P-ro Goudé ĉeestis en Boulogne, li povis aranĝi diservon por la tieaj kongresanoj.

Tiu diservo okazis sabaton 27-an de aprilo je la 18-a, en kapelo de la baziliko. Partoprenis dudeko el la cent kongresanoj. Gvidis la kantojn S-ro Angevin, prezidanto de la Centrokcidenta Federacio, kaj ĉiuj tutkore kantis.

P-ro Goudé lasis al la organizintoj de la kongreso esperantan tekston de la kanto al Nia Sinjorino de Boulogne.

Laù la legendo, ĉ. la VII-a jc, la Virgino aperis al Bulonjanoj, petante, ke ili iru ĝis la maro por trovi sur boato ŝian bildon. Oni honoris tiun skulptaĵon ĝis la Franca Revolucio, kiam homoj bruligis ĝin. Restis nur unu mano, kiun oni konservis. En la XIX-a jc, oni skulptis alian statuon(la Virgino staras, tenante Jesuon sur sia maldekstra brako kaj krucon en la dekstra mano). Sed ĉ. la 30-aj jaroj de nia jarcento, oni konstatis, ke la antaùa statuo montris la Virginon sidantan. Tiam oni skulptis, el libana cedra ligno, la surboatan statuon, el kiu kvar kopioj trairis Francujon post la lasta mondmilito.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## IKUE-MEMBROJ

34. P-ro RUNPAOT; 35. S-ro COLARUOTOLO; 36. S-ro PONS; 37. F-ino PREUX; 38. S-ino RIBOT; 39. S-ro VIDONNE.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## AMIENS

Malgraù la certa ĝeno kaùzita de la samtempa okazado de pluraj Esperanto-aranĝoj (Grésillon, Bouresse, Boulogne/Mer kaj Amiens), la FKEA-kongreso ricevis 24 aliĝojn (pli ol en Bouresse pasintjare). Partoprenis efektive , tute aù parte, 21 homoj. S-ro Colleu, helpe de kelkaj gelernantoj kaj de la edzino, majstre organizis nian restadon, ne nur materie sed ankaù spirite, zorge preparinte la necesajn liturgiajn tekstojn por niaj diservoj, kaj por la urbaj vizitoj. Supozeble li ankaù speciale rilatis kun la ĉielaj instancoj, ĉar ĝis mardo, ni ĝuis belegan veteron kaj povis senĝene promeni en la vasta parko de la Instituto aù tra la urbo. Mardon matene, subite ekploris la anĝelaro, eble pro nia baldaùa forveturo, kaj post la tre interesa vizito de la pikarda muzeo, ni devis malsekiĝi por reatingi la aùtojn. Ni jam rezignis pri la boata promenado tra la legomkultivejoj, sed, ho miraklo! fine de la tagmanĝo, la bona frato, kiu ĉiam tre atente priservis min dum nia tuta restado, prognozis plibonigon de la vetero en la posttagmezo. Plenfide, ni reenaùtiĝis, sed ĉe la haveneto, kiam ni enboatiĝis, ree ekpluvis. Ne gravas! la boatisto rapide disdonis vastajn pluvombrelojn kaj ek! Post kelkaj minutoj jam ĉesis la pluvo kaj ni povis tute trankvile navigi tra la kanaletoj dum tuta horo, observante la laboron de la ĝardenistoj.

Pro tiu supra priskribo, ne pensu, ke ni nur promenis kaj turismis. Tute ne! Ni ankaù serioze laboris, eĉ ŝvitis pri la kongresa temo "La kristanoj esperantistaj", majstre prezentita de P-ro Bourdon kaj poste pri-studita kaj -diskutita en tri grupoj. Ĉar la protokolinto ankoraù ne sendis sian artikolon, ĉi tiu aperos en la venonta bulteno.

J. V.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

## LYON 1992

Kiel anoncite en nia marta numero, la FKEA-kongreso 1992 okazos en

Maison St-Joseph "Chantegrillet"<br>
161, chemin des Fonds<br>
69340 FRANCHEVILLE Tel. 78 59 22 35

de la 30-a de aprilo ĝis la 3-a de majo 1992.

Pliaj informoj sekvos en la venontaj numeroj, sed bonvolu jam nun rezervi tiujn datojn.

## ANGULO DE LA KASISTINO-REDAKTORINO

Kelkaj ventkapuloj tute forgesis pagi sian kotizon 1991. Ĉar ili verŝajne ne legas la bultenojn en kiuj jam aperis diskretaj memorigoj, ili ricevos personan alvokon, sed se ili ankaŭ ne aŭdos ĝin, ve! ili ne plu ricevos F.K.E.

Ĉi tiu numero enhavas nur 4 paĝojn; tiom mi tre bedaŭras, sed mi povas aperigi nur la materialon, kiun mi ricevas de la legantoj. Se vi scias ion interesan, ne hezitu, sendu al mi. Vi profitigos la ceterajn membrojn je via sperto. Ne forgesu ankaŭ anonci viajn familiajn novaĵojn; ni volonte dividos kun vi ĝojojn kaj malĝojojn. Se ni volas allogi novulojn, ni nepre devas montri al ili indan bultenon, ĉu ne? Kaj F.K.E. ne estas MIA afero, sed ĈIES afero. Ek al viaj globkrajonoj!

---

## ENHAVO

1. Le mot du président
2. Agadraporto 1990
   La homa vigleco
   La giganta lutro
3. Boulogne-sur-Mer
   Amiens
   Lyon 1992
4. Angulo de la kasistino-redaktorino

---

## KOTIZTABELO 1991

| | | |
|---|---|---|
| I.K.U.E. kun "Espero Katolika" | | 140 F |

Peranto: P-ro R. DEGRELLE c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

------------

| | | |
|---|---|---|
| A.C.F.E. kun "Franca Katolika Esperantisto" | unuopulo | 40 F |
| | geedza paro | 50 F |
| | infano ĝis 16-jara, pastro, religiul(in)o | 20 F |
| | bonfaranto | 200 F |

------------

| | |
|---|---|
| U.F.E. kun "Revue Française" kaj "E° Actualités" | 235 F |
| U.E.A. kun "Esperanto" kaj Jarlibro | 225 F |

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

---

Dépôt légal: 2è trimestre 1991

C.P.P.A.P. n° 62 532.

Directeur: Albert BESSIERE

Directeur-délégué:
René-Jean MARMOU

!! Polycopié par l' A.C.F.E. (enregistrée
!! le 6 mai 1977 à la sous-préfecture de
!!Saumur sous le n° 2523 bis-J.O.23/05/1977)
!! au prieuré St-Martin
!! 77610 LA HOUSSAYE EN BRIE
!! FRANCE